

# CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO  
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 95**

***N-RO 4 (72), MAJO 2018***

# Enhavo

<i>Originala poezio</i>	
<i>Klara Ilutovič</i> Ekspozicio de Vasilij Veresĉagin	3
Nigra dimanĉo	4
<i>Nikolao Neĉaev</i> . Tri tagoj de pentristo	5
Lirikulo	5
<i>Tradukita poezio</i>	
Poemoj de <i>Elena Miĥajlik</i> tradukitaj de <i>Tatjana Auderskaja</i>	
Atena	6
Norda vento	7
Ravenna	7
<i>Originala prozo</i>	
<i>Jindřiška Drahotová</i> . Miaj danĉecionoj en pasinta jarcento	9
<i>Valentin Melnikov</i> . Versportret-konkurso	11
<i>Tradukita prozo</i>	
<i>Anton Ĉehov</i> . Nova vilao. Traduko de <i>AleksandrMilner</i>	14
<i>Konkurso de tradukoj</i>	24
<i>Humuro</i>	
Iom da materialoj de la urala reta aktivaĵo “Transdonu bonhumoron”, elektitaj de ties kunordiganto <i>Raja Kudrjavceva</i>	25

## Originala poezio


### Ekspozicio de Vasilij Veresĉagin

#### *Klara Ilutoviĉ (Elektrostal)*

1

Sango krias, espero foriras,  
Ankaŭ tero mem iĝas viktim'.  
Drako de la milit' fajre spiras  
Je maljusto, feroco kaj krim'.


Sen vuali la ŝokon spiritan,  
En la alta artista sagac'  
Bildigante la veron militan?  
Per peniko li luktis por pac'.



Pafmortiga team' senkompata,  
ies kap' forhakita en man'...  
En militoj la vivo soldata  
Pasas ĉiam sub mortorikan'.

Banĝejo, kadavroj, venkitoj...  
Fal' kaj morta dolor' kaj sufer'...  
Teruraĵoj de ajnaj militoj  
Vivas sur ĉiu tol' de la ver'.

Krias arde penik- alvokinto  
En la granda pentrista aŭdac',  
Ke en apoteoz' de l' milito  
Vivu sankta memor' pri la pac'.



2

Ankaŭ pacon li pentris abunde –  
la naturon, la homojn tra l' mond'''.  
Lin impresis alvoke-profunde  
Pastro, mizerulin', vagabond'.

Jen majestas Kazbek' ore-blue  
Dum leviĝo de sun' en montar'.  
Ien roĝo impetas kurbrue.  
Helas val' en la flora tolar'.

Tempoj, sortoj, humoroj, eventoj.  
Tamerlana pordeg', Taĝ-Mahal'.  
De diversaj kulturoj vivsentoj.  
La riĉeco de monad real'.

De l' pasinto humora motivo  
Kaj bolado de l' krea spirit'  
Proksimigas vastegon de l' vivo  
En koloroj de l' pac' kaj milit'.



## **Nigra dimanĉo**

(Kemerovo, 25.03.2018)

Ekplodigis kutiman humoron  
Komuniko pri la incendi'.  
L' mondo spertas kruelan doloron,  
Kemerovo, ni estas kun vi!

De turmenta sufer oceanoj,  
Malesper', senvivec', muta kri'...  
Ne revenos plu hejmen infanoj...  
Kemerovo, ni estas kun vi!


Monstra krimo de la malzorgemo,  
de senord', de l' feroca defi'.  
Tro malfruaj tumulto kaj tremo...  
Kemerovo, ni estas kun vi!

Venu fortoj al ĉiu parenco  
De viktimoj de la tragedi'  
Por pluiv' kvazaŭ ekde komenco!  
Kemerovo, ni estas kun vi!

## **Tri tagoj de pentristo**

1

Li iras laŭ radio,  
Li iras sub ĉielo,  
Li iras super herbo,  
Li iras apud vento,  
Li iras tra printempo,  
Li iras al inspir'.



2

Sur lazura tolo  
Pentras blanka farbo  
Nubon, laron, velon.  
La pentrist' malriĉas,  
Havas unu farbon.  
Sed la laro kriĉas,  
Sed la velo ŝuŝas,  
Sed la nuboj mutas.

3

La pentraĵo vivas,  
Vekas koron lian.  
Lia koro ŝvebas  
Lare ĉe la nuboj,  
Velas al feliĉo.  
La pentraĵo vokas  
Lasi hejmon lian,  
Vivi apud maro,  
Nuboj, laro, vel'.

## **Lirikulo**

Li estas lirikulo.  
Pro tio kore nur  
Parolas mara hulo,  
Parolas venta kur'.

Li modlas metaforon  
El nuboj kaj skual'.  
LI amas velan foron,  
Eskapas al Bajkal'.

## *Tradukita poezio*

### **Poemoj de Elena Miĥajlik<sup>1</sup>**

#### *Tradukoj de Tatjana Auderskaja*



**Атена**

1

La Diparadizo fermitas al ni por ĉiam'.  
Атена – en grizaj okuloj glacie briletas  
flam'.  
Eternas la saĝo de vi, malgraŭ tempa  
distanĉ',  
Kaj iĝis olivo la teron penetra lanc'.  
Laŭ volo de vi sur ruinoj altiĝis altar',  
Aperis la urbo, reganto de mensoj kaj  
mar'.  
Jarcentoj trapasos, kaj jam kun alia la  
nom'  
Vi kiel Minerva protektos la filojn de  
Rom'.  
Sed venkos mizero la saĝon, kaj sinkos  
en fal'  
Flugiloj majestaj post glora fiera batal'.  
Vi flugos meznokte, en morna silenta  
angor',  
Sed fremdas la mondo, kaj portas pereon  
l' aŭror'.  
La strigo senpaca... Ho, kiel teruras  
kreiv'  
De l' viv' senracia, naskanta racion sen  
viv'!  
Finiĝos la mondo. Je l' nomo de akvo  
kaj flam',  
Memor' mia, restu! Kaj venu al fin' kun  
aklam'!



**Афина**

1

Господнего града не взыскивать нам  
никогда,  
Афина-Паллада – глаза из  
гренландского льда.  
Вовеки нелживо могучее слово твоё –  
И стало оливой вонзённое в землю копьё.  
Из хлама и сора, из тлена, по воле твоей  
Возносится город – владыка умов и  
морей.  
Под именем первым забыта, вернёшься  
назад  
премудрой Минервой, щитом  
италийских волчат.  
Песчаные крылья... В отчаянном, долгом  
бою  
осилит бессилье жестокою мудрость  
твою.  
Гонима тоскою, несёшься порою ночной  
полярной совою над миром, который не  
твой.  
Сухим пересказом, крылом  
белоснежным коснись,  
безжизненный разум, творящий  
безумную жизнь.  
Мир в прошлое канет. Во имя воды и  
огня,  
Владычица-Память, прости и помилуй  
меня.

---

<sup>1</sup> Elena Miĥajlik estas poetino kaj literaturologo el Odeso, nun loĝanta en Aŭstralio.

## Norda vento

Ni neniam plu ĉe komuna tabl'  
Sidos en agrabla agord',  
Ĉar la vento norda penetris tra  
Frakasita rabie pord'.  
Ĝi elrompis vitron el febla krad',  
Ĝi forblovis flamon de l' form',  
Kaj en sia senkompata invad'  
Prenas nin, kaj forportas for.  
Kaj al ni, amantoj de pac' kaj kviet',  
De libroj, scio kaj song'  
Estas destinite al nokta silent'  
Foriri el varma loĝ'.  
Ĝuste nin atendas la urba milit'  
Kaj odor' de pulvo kaj polv',  
Ĝuste nin sur sonora strata granit'  
Militpafos nokta patrol'.  
Vento tranĉas urbon kun akra fort',  
Nia vivo spitas al ni,  
Nia temp' kiel distordita kord',  
Nin atendas lun' kaj neni'.  
Ni ne scias, kio okazos post,  
La mallum' ne timigas nin,  
Ĉar la vento norda frapis al pord',  
Ĉar ni lasis eniri ĝin.

## Ravenna

Al la bordo laga peze ruliĝas ond',  
Kaj ekstaris el blanka ŝaŭmo vidaĵ'  
solena:  
Temploj, muroj marmoraj – majesta  
mond',  
Kiu sur ĉi-Tero nomiĝas urbo Ravenna.  
  
Temploj, muroj marmoraj – majesta  
mond',  
Protektata por ĉiam per Dia Man'  
ĉiorova.  
Venu, tuŝu, memoru – jen ĉies fond',  
Fort', potenco kaj glori de Romo  
malnova.  
  
Sed ne ĉiuj volas “rekviemi en pac’”,  
Ĉar la dorm' en polm', l' Obeon rompanta  
Pomo –  
Tiu urbo sur sep montetoj, virt' kaj aŭdac',

## Северный ветер

Нам уже не длить за общим столом  
давний счёт побед и потерь.  
Ибо северный ветер ворвался в дом,  
по дороге выломав дверь.  
И летит стекло из окна листом,  
и огонь над плитой погас.  
Ибо северный ветер ворвался в дом  
и уносит из дому нас.  
Это нам, любившим только покой,  
только книги, знания, сны,  
выходить навек вечерней порой  
на асфальт городской войны.  
Это нам в дешёвый табак мешать  
горький прах далёких полей,  
на истёртых улицах воскрешать  
звонкий шаг ночных патрулей.  
Наше время скручено, как струна,  
нашу жизнь развернуло вспять.  
Это нас – подвалы, штыки, луна –  
по ночам не будут искать.  
И зачем гадать, что будет потом –  
мы уже не увидим тьму.  
Ибо северный ветер ворвался в дом,  
ибо мы открыли ему.

## Равенна

На озёрный берег выкатился прилив,  
поднялись на свет из круто кипящей  
пены  
белый мрамор стен, глухая зелень олив –  
всё, что в мире этом носит имя Равенны.  
  
Белый мрамор стен, глухая зелень олив,  
а над ними рука господня лежит,  
незрима.  
Подойди, коснись, запомни, покуда жив,  
ибо это мудрость, мощь и величье Рима.  
Но не все желают здесь доживать свой  
срок,  
потому что камнем в окно, ледышкой за  
ворот  
на семи холмах, на скрещенье древних  
дорог –  
Вечный город, который город, который

En kruciĝo de ĉiuj vojoj, eterna Romo.

La aer', per kiu ni spiras, la nokta rev',  
La eterna Patrujo, kie ni naskiĝis ĉiuj...  
Ĉu nin povas indulgi la Papo Sanktega,

se  
Ni memoras, ka antaŭ la Dio regadis  
Dioj?

Ni aŭskultis Platonon anstataŭ preĝeja  
ĥor',

Lernis mondhistorion laŭ propra  
genealogio,

Kaj pri niaj versaĵoj vastege aŭdiĝas  
glor' –

En drinkejoj ĉiuj, alterne kun  
sakrilegioj.

Sed Ravenna estas beata sub Dia gard',

Kaj de ĉiu muro rigardas la Mastr'  
ĉiela...

Tamen, pri niaj ludoj de alta hazard'  
Vi demandu ĉe korvar' apud mur'  
bordela!

Renversiĝis kaliko, kaj flugis soren  
anĝel'...

Sed ja devas iu protekti sanktaĵojn niajn:

La eternevivantan, karesan por la orel'  
Lingvon, en kiu verkis Katull' kaj  
Virgil' geniaj!

Ni staras lastaj kontraŭ obskur' kaj  
Neni',

Kaj inundas la Urbon norda tribar'  
abomena...

Ĉio, kion atingis, kion meritas ni –  
Estas ŝanco pereji en Rom', sed ne en  
Ravenna.

Fumo nigra kaj grasa alflugas al Rejna  
bord'

El ruinoj de l' mond', de kiu restis nur  
nomo.

Sed post tricent' jaroj la konkerinta hord'  
Iĝos mem eternevivanta kaj glora  
Romo!

Город.

Воздух наших дней, ночей неусыпный  
страж,

старший брат, товарищ, мрамор  
единокровный –  
нам читать Платона раньше, чем "Отче наш",  
изучать историю мира по родословной.

Разве может святой отец отпустить  
грехи

тем, кто помнит, что прежде Бога  
царили боги?

А о том, как мы умеем писать стихи,  
знают все притоны Аппиевой дороги.

А Равенна – это пепельный крест во лбу  
и с любой стены следит небесный  
хозяин.

А о том, как мы умеем играть в судьбу,  
чем кончаем мы, спроси воронье окраин.

Расплескалась чаша, ангел взмахнул  
крылом,

но ведь должен кто-то встать за наши  
святыни –

за стихи Катулла, девочку за углом  
и привычный слуху звук площадной  
латыни.

Мы стоим плотиной на побережье тьмы.

После нас – холодный дождь, пустота,  
забвенье.

Всё, чего мы стоим, всё, что получим  
мы,

это шанс погибнуть в Риме, а не в  
Равенне.

Там на севере – синий Рейн, и плывёт  
над ним

то, что стало нынче жирным, тяжёлым  
дымом.

После нас... но всё же тот, кто захватит Рим,  
за каких-нибудь триста лет тоже станет  
Римом.



## *Originala prozo*

### **Miaj danclecionoj en pasinta jarcento**

*Jindřiška Drahotová (Ĉeĥa Respubliko)*

Jam pasis tempo, longa tempo, kiam mi estis knabino dekkvardeksejara. La rememoroj revenas, kvazaŭ ili venus el alia mondo. Tamen surprize nur malmulto el ili perdiĝis. Tiu tempo estis grava, emocia tempo por mia venonta vivo. La tempo por eniro en la socion – tempo de danclecionoj.

Mia juneco pasis dum kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento, kiam Stalin kaj Gottwald jam estis en ĉerko kaj ni startis vivon en la socio kiel espero de nacio kaj rapidis al maturiĝo.

Danclecionoj estis necesa kondiĉo. En nia urbo servis por tio salono en hotelo “Grand” en malnova parto de la urbo Mladá Boleslav. Oni subiris tien tra sep ŝtupoj, ĉiam tie ludis orkestro, per mallarĝa ronda ŝtuparo oni povis iri al supra etaĝo, kie estis vinejo kaj kien nur malofte kuraĝis knabo gvidi knabinon. Supre troviĝis ankaŭ balkono, de kie scivoluloj rigardis desupre la salonon.

Nur nun mi konscias, kiel perfekte estis ĉio organizita, preparita, perfekta... Kia deca tio estis, la veno al la socio de ni – junaj homoj, espero de la nacio.

La preparoj estis malfacilaj. La robojn kutime kudris kudristinoj, por ke la roboj perfekte „sidu“. Por ordinaraj tagoj ni, knabinoj, kudris por si robojn hejme mem laŭ papera ŝablono farita de kudristino, sed por danclecionoj estis bezonataj pli belaj roboj – tri diversaj. Pro tio estis necese perlabori monon. Somere mi kolektis mirtel- kaj vakciniojn, kiujn mi vendis iam tuj en stacidomo ĉe la monto Bezděz, aŭ mi portis ilin en kolektejon en urbo.

Krome estis bezonata kroĉtriki fajnajn, blankajn gantojn, lerni paŝi en specialaj ŝuoj sur kalkanumo (*šipetoj*), elekti konvenan braceleton kaj ĉirkaŭkolan ornamaĵon kaj krei ornamaĵojn por niaj ŝatataj dancantoj okaze de la lasta tago de danclecionoj – „kroneto“.

Iafoje akompanis nin timetoj, ĉu estos sufiĉa nombro da knaboj, por ke ni ne restu honteme stari en angulo, ke ni ne tenos niajn movojn kun muziko, ke invitoj nin knabo, kiu ne plaĉas al ni, ke dancmajstro atentigos pri nia mallerteco...

Ĉiu el ni havis sian „gardsinJORINON“ – patrinon, onklinon, pliaĝan amikininon. Ili rigardis de la balkono kaj estis unuaj kritikistoj, konsilantoj kaj ravitaj admirantoj.

La leciono komenciĝis per elekto de paroj. Knabinoj staris en vico kontraŭ vico de knaboj kaj la dancmajstro diris laŭte timigan vorton: „Dancinvitu!“ kaj knaboj elkuris amase al la knabina vico kaj la gejunuloj kreis parojn.

„Promenu kaj konversaciu!“ Kaj ni knabinoj estis alparolataj kaj daŭrigis parolon kaj prezentadon. Poste la dancmajstro kun sia partnerino montris kiel ĝuste brakumi knabinon kaj knaboj en blankaj gantoj imitis lin. Kaj oni komencis danci „mazurkon“. Ho, mazurko! Ni povis rigardi knabon de maldekstre, de dekstre kaj post turniĝo ni konatiĝis kun alia dancanto kaj kun pli kaj pli alia, ĝis mi renkontis knabon, kiu invitis min por danci. Tiel mi eksciis, kiu knabo trinkis bieron por kuraĝo aŭ fumis, kiu ne havas problemojn kun dancaĵoj kaj kiu ne ŝvitas.

Iom post iom ni fariĝis pli memfida, pli gajaj kaj parolemaj. Ĉio okazis dece, grave por ni. Ni estis entuziasmaj.

La danclecionojn finis „vĕneĉek“ – dancvespero. Ni vestis longajn robojn kaj, krome, ni estis certaj, ke post danclecionoj ni havas eblon kun niaj novaj konatoj kunveni sur la sama loko, ĉar okazos posttagmezaj „teumoj“ dufoje semajne por danco, aŭ nur iom atendi por rendevuo kaj jam sen dancmajstro kaj „gardsinJORINOJ“.

Viziti danclecionojn estis konvene nur dum du jaroj, ĉar poste ni jam estis „tro“ maljunaj. Kaj ankaŭ finiĝis nia juneco kaj studado. Necesis komenci labori, ofte en malproksima loko laŭ ordono de ofico. Edziniĝo en dekokajariĝo estis offta kaj la vivo daŭradis. Kaj knaboj foriris en armeon servi por du jaroj.



2018

## Versportret-konkurso

### Valentin Melnikov

En 2016-2017 *La Ondo de Esperanto* okazigis konkurson, en kiu Valentin Melnikov verse prezentis vaste konatajn esperantistojn, kaj la tasko de legantoj estis diveni la nomon de la prezentatoj.

Ne ĉiuj el la ĉi-subaj versportretoj aperis en la revuo. Respondojn oni povas vidi ĉe la paĝo 24.

#### 1.

Ŝi estas tri: virin', lektor', poeto.  
Respondon serĉu vi sur librobreto:  
jen faktoj, fantazioj, rimleteroj,  
virino ĉe landlim', aliaj eroj  
en kiuj estas majstre priskribata  
kaj homa amo, kaj la vivo kata.  
Duonjarcenton en Akademio,  
eĉ kandidato por Nobel-premio,  
kaj tiel plu. Enigmo ja facilas.  
Respondu do: pri kiu mi babilas?

#### 2.

La suda vintro neĝon malfavoris,  
do li al nordo venis kaj laboris.  
Jen blanka neĝ' kaj nigra karb' minoras,  
sed mem li, kiel ŝton', alikoloras.  
Pri Zimbabve', pri ĉinoj kantis arde,  
pri oksikoko – do famiĝis barde.  
Koncertas li por francoj kaj germanoj,  
kaj dume – aperadas eĉ romanoj:  
pri brava kapitan', pri stel-revado...  
Jen tia plurtalenta kamarado.

#### 3.

Tra l' mondo faris multajn li veturojn,  
priskribis ankaŭ la falantajn murojn.  
Nur kakatuoj, sed ne papilioj  
flugadas super la roman-folioj.  
Instigas li mediti pri l' naturo,  
ke ne detruu ĝin la homa spuro.  
Ja ne forgesu, kiom efemera,  
fragila estas nia viv' surtera.  
Ni ĉiuj estas homoj! Vivu frate!  
La Ter' prosperu, de raci' gardate!

#### 4. (*necesas nomi ankaŭ la duan poeton!*)

Taglibron verkis la nenifaranto,  
atentis poste pri la korva kanto,  
kaj intertempe en eseo saĝa  
li skribis pri kolego, la pliaĝa.  
Kaj la kolego famas multe pli:  
Laŭ neplanitaj padoj paŝas li,  
el fontoj nevideblaj akvon prenas,  
kaj lia lingvo ĉiam plu serenas.  
Refoje vi aliru librobretojn,  
omaĝu laŭ merit' la du poetojn.

#### 5.

Sciulo dokta priliteratura  
(Se restus ĝi okupo lia nura!)...  
Sed li *promulgis* sin aŭtoritato  
En la bizara virtuala ŝtato.  
En la PEN-Centro li tre multe *penis*,  
Sed multaj mokoĵ, ne aplaŭdoĵ venis.  
Do kion fari? – Bridi ambiciojn  
kaj por utilo uzi verajn sciojn.  
“Poeto sen popolo” – vortoj plaĉas,  
sed caro sen popolo vere aĉas.

#### 6.

Lin bone konas la esperantistoj:  
ja membras li en ĉiuj dissend-listoj,  
informas vigle, eĉ se iom ĝene,  
replikas akurate kaj senpene.  
La Asocion iam li prezidis,  
lernilojn verkis, lokajn grupojn gvidis.  
Pri *bona lingvo* zorgas li konstante  
(do danku lin *koree-komencante!*)  
La aktivado daŭras plu sen fino...  
Do *knedu* lin eterne, sinjorino!

#### 7.

Ne tro facilas ŝia vivo-pado:  
mastrino de l' retej' pri edukado  
el Hungari' al Nederlando venis,  
instruis multe, gvidis, ekzamenis,  
disertaciis pri propedeŭtiko,  
kaj dank'al ŝi aperis Poŝamiko;  
La stelsemantoĵ en la ora nordo  
en ŝia libro vivas en agordo.  
Sindone kaj senlace ŝi laboras.  
Jen tiaĵ homoj vere plej valoras!

## 8.

Hungar', loĝanta en Eŭropo ie,  
en multaj sferoj agas energie.  
Redaktas, journalistas, interpretas,  
kaj jen – poemoj *provizoraj* pretas,  
Revuoj multas – granda fask' papera,  
kaj ankaŭ sen paper' – *Foli' libera*.  
Meritas legon lia verko pinta –  
satiro pri *Postdom'* kadukiĝinta.  
Lipharoj kaj rideto ironia  
aldonas ĉarmon al heroo nia.

## 9.

Jen estas plia fenomen' kultura:  
Poeto fama – la *ekstema, dura*,  
verkant' pri ĉio – pri hakil-siliko,  
pri celakantoj kaj pri stranga spiko,  
En lia poemar' miksiĝis ĉio.  
Laŭ iuj – jen profund-filozofio...  
Kaj ankaŭ aktivulo interreta  
li estas, tuj reagi ĉiam preta.  
Ne dubu vi pri lia genieco –  
aŭ li insultos vin sen ajna deco!

## 10. (nomu ankaŭ la amikinon!)

La denaskulo, jam de l' aĝo eta  
aktiva, vojaĝema kaj *impeta*  
bonŝance trovis la feliĉon veran –  
la amikinon vervan kaj sinceran.  
Do jen la libroj, la studentaj grupoj,  
fabela mond' de grandokulaj pupoj.  
Tre multas kaj tre gravas la laboro,  
precipe nun – estante redaktoro.  
Por renkontiĝ' gastamas hejm' ilia,  
kunvenas ĝue *rondo familia*...

## 11.

Vi vane irus nun al librobreto:  
“La Ondo” jam fariĝis bit-gazeto.  
Tendenco jen totala kaj fatala:  
ĉirkaŭas nin la mondo virtuala.  
Sed tiun mondon nia homo regas,  
li en diversaj sferoj laboregas.  
Progresas la afer' vikipedia,  
centmiloj venas jam al lingvo nia  
per Duolingo. Ankaŭ por Ludisto



#### I

Tri verste de la vilaĝo Obruĉanovo oni konstruis grandegan ponton. El la vilaĝo, alte staranta sur kruta bordo, videblis ĝia krada truso, kaj dum nebula vetero kaj dum kvietaj vintraj tagoj, kiam ĝiaj maldikaj feraj solivoj kaj ĉiuj skafaldoj estis ĉirkaŭprujnitaj, ĝi prezentis bildon pitoreskan kaj eĉ fantastan. Tra la vilaĝo foje veturis en droŝko aŭ en kaleŝo ĉefinĝeniero Kuĉerov, la konstruisto de la ponto, dika, ŝultroza, barboza viro en mola taŭzita kaskedo, foje dum festoj venadis proletoj, laborantaj ĉe la ponto, ili almozpetis, mokis virinojn, kaj foj-foje ion forprenadis. Sed tio okazis malofte, kutime tempo pasis kviete kaj trankvile, kvazaŭ la konstruaĵo tute ne estis, kaj nur vespere, kiam apud la ponto lumis lignofajroj, vento mallaŭte portis kantadon de la proletoj. Kaj tage iam aŭdeblis trista metalsono: don... don... don...

Foje al la ĉefinĝeniero Kuĉerov venis lia edzino. Al ŝi plaĉis la riverbordoj kaj la luksa vidaĵo al la verda valo kun vilaĝetoj, preĝejoj, gregoj, kaj ŝi ekpetadis la edzon, ke li aĉetu parceleton kaj konstruu tie vilaon. La edzo konsentis. Estis aĉetita dudek desjatinoj <sup>[1]</sup> da tereno kaj sur alta bordo, ĉe kampeto, kie antaŭe vagadis bovinoj de Obruĉanovo, estis konstruita bela duetaĝa domo kun teraso, kun balkonoj, kun turo kaj kun kapstano, sur kiu dimanĉe altiĝadis flago, estis konstruita dum nuraj tri monatoj, kaj poste dum la tuta vintro estis plantataj grandaj arboj, kaj kiam venis la printempo kaj ĉio ĉirkaŭe ekverdis, en la nova bieno jam estis aleoj, ĝardenisto kaj du laboristoj en blankaj antaŭtukoj fosadis apud la domo, ŝprucis fontaneto, kaj glacoglobo brulis tiom brile, ke estis dolore spekti. Kaj estis jam la nomo de ĉi-bieno: Nova vilao.

Helan varman matenon, fine de majo, en Obruĉanovon al tiea forĝisto Rodiono Petrov' oni venigis du ĉevalojn por referumi. El Nova vilao. La ĉevaloj estis blankaj kiel neĝo, sveltaj, sataj kaj konsternaj similaj.

— Veraj cignoj! — diris Rodiono, rigardante al ili kun admiro.

Lia edzino Stepanino, gefiloj kaj genepoj venis surstraten por rigardi. Poiomete kolektiĝis amaso. Venis Lyĉkovoĵ, la patro kaj la filo,

ambaŭ denaske senbarbaj, kun ŝvelintaj vizaĝoj kaj senĉapelitaj. Venis ankaŭ Kozov, alta maldika maljunulo kun longa mallarĝa barbo, kun kroĉbastono; li ĉiam palpebrumis per siaj ruzaj okuloj kaj moke ridetis, kvazaŭ ion sciis.

— Nur blankaj estas, sed kio plu? — li diris. — Donu avenon al la miaj, estos same nutritaj. Lignoplugilon al ili kaj vipon...

La koĉero nur rigardis al ili kun malestimo, sen nenion diris. Kiam poste en la forĝujo oni bruligis fajron, la koĉero rakontadis, fumante cigaredojn. La viroj eksciis de li multajn detalojn: liaj mastroj estas riĉaj; la mastrino Jelena Ivanovna antaŭ edziniĝo loĝis en Moskvo malriĉe, kiel guvernistino; ŝi estas bona, kompatema, kaj ŝatas helpi al malriĉuloj. En la nova bieno, li rakontis, oni nek plugos, nek semos, sed nur vivos por sia plezuro, nur por spiri puran aeron. Kiam li finis, revenigis la ĉevalojn, linpostiris knabamaso, bojis hundoj, kaj Kozov, rigardante sekven, moke palpebrumis.

— Je-en bienuloj! — li diris. — Domon konstrus, ĉevalojn ekbredis, tamen mem ne havas kion manĝi, je-en bienuloj!

Kozov iel dekomence ekmalŝatis kaj la novan bienon, kaj la blankajn ĉevalojn, kaj la satan belan koĉeron. Tio estas homo soleca, vidvo, li vivis malgaje (al li malhelpis labori ia malsano, kiun li nomis ĉu tensio, ĉu tenio), nutromonon li ricevis ĉe la filo, laboranta en kukejo en Ĥarkovo, kaj de frumateno ĝis vespero vane vagadis laŭ la bordo aŭ la vilaĝo, kaj se vidis, ekzemple, ke homo veturigas trabon aŭ kaptas fiŝon, do diris: “ĉi-trabo staris seka, putris” aŭ “ĉi-vetere oni hokon ne tuŝas”. Dum sekeco li diris, ke ne pluvas ĝis frostoj, kaj kiam pluvis, li diris, ke nun ĉio putros en kampoj, ĉio fiaskis. Kaj samtempe ĉiam palpebrumis, kvazaŭ ion sciis.

Vespere en la bieno oni bruligadis Bengalajn fajrojn kaj raketojn, kaj preter Obruĉanovo iradis sub velo boato kun ruĝaj lanternetoj. Unufoje matene en la vilaĝon veturis la edzino de la ĉefingenero Jelena Ivanovna kun malgranda filino, en kaleŝo kun flavaj radoj, post paro de maronkoloraj poneoj; ambaŭ, la patrino kaj la filino, estis en pajlaj ĉapeloj kun larĝaj kampoj, fleksitaj al la oreloj.

Tio estis ĝuste dum sterkumado, kaj la forĝisto Rodiono, alta, magra maljunulo, senĉapelita, nudpieda, kun sterkilo sur la ŝultro, staris apud sia malnova, malbela ĉaro kaj, konsternita, rigardis al la poneoj, kaj videblis laŭ lia vizaĝo, ke li neniam antaŭe vidis tiom etajn ĉevalojn.

— La Kuĉerovino venis! — ĉirkaŭaŭdeblis, — Jen, la Kuĉerovino venis!

Jelena Ivanovna rigardis al domoj, kvazaŭelektante, poste haltigis la ĉevalojn apud plej malriĉa domo, kie en fenestroj videblis tiom da infankapoj — blondaj, nigraj, rufaj. Stepanino, la edzino de Rodiono, dika maljunulino, kuris el la domo, ŝia kaptuko glitis de la griza kapo, ŝi rigardis

al la kaleŝo kontraŭ suno, ŝia vizaĝo ridetis kaj faltiĝis, kvazaŭ ŝi estis blinda.

— Tio estas por viaj gefiloj, — diris Jelena Ivanovna kaj donis al ŝi tri rublojn.

Stepanino subite ekploris kaj terkliniĝis; Rodiono same falis, montrante sian larĝan, brunan kalvaĵon, kaj dume preskaŭ pikis per sia sterkilo la edzinon en la flankon. Jelena Ivanovna konfuziĝis kaj veturis reen.

## II

Lyĉkovoĵ, la patro kaj la filo, kaptis ĉe sia herbejo du ĉarĉevalojn, unu poneon, kaj larĝmuzelan Aalhaus-bovidon, kaj kun rufkapa Volodaĉo, filo de la forĝisto Rodiono, pelis ilin al la vilaĝo. Vokis la vilaĝestron, elektis atestantojn, kaj venis inspekti la damaĝon.

— Bone! — diris Kozov, palpebrumante. — Bo-one! Do ili baraktu, inĝenieroj. Ĉu mankas juĝo? Bone.

Voku ni policinspektoron, kompilu akuzaĵon.

— Kompilu akuzaĵon! — ripetis Volodaĉo.

— Mi ne volas lasi tion! — kriis la filo Lyĉkov, kriis pli kaj pli laŭte, kaj pro tio lia senbarba vizaĝo ŝajne ŝveliĝis pli kaj pli. — Kia kutimo! Se permesi, ili damaĝos ĉiujn herbejojn. Vi ne rajtas mistrakti la popolon! Nun servutoj ne estas!

— Nun servutoj ne estas! — ripetis Volodaĉo.

— Ni vivis sen ponto, — makabre ripetis la patro Lyĉkov, — ne petis, kial ni bezonas ponton? Ne volas!

— Fraĉjoj kristanoj! Ne devas tion ignori!

— Bo-one! — palpebrumis Kozov. — Do ili baraktu! Jen bienuloj!

Oni revenis al la vilaĝo kaj irante la filo Lyĉkov ĉiam sin pugnobatis al la brusto kaj kriadis, kaj Volodaĉo ankaŭ kriadis, ripetante liajn vortojn. Kaj en la vilaĝo tamen apud la bonrasa bovido kaj ĉevaloj kolektiĝis vera amaso. La bovido estis perpleksita kaj rigardis desubfrunte, tamen subite klinis la muzelon al grundo kaj kuris, kalcitrante per arieraj hufoj, Kozov ektimis kaj svingis kontraŭ li per bastono, ĉiuj ekridegis. Poste oni ŝlisis la beston kaj ekatendis.

Vespere la ĉefinĝeniero sendis kvin rublojn pro la damaĝo, kaj la ambaŭ ĉevaloj, poneo kaj bovido, ne nutritaj kaj ne trinkigitaj, revenis hejmen, kapoj pendinte, kiel kulpuloj, kvazaŭ venigitaj por ekzekuti.

Ricevinte kvin rublojn, Lyĉkovoĵ, la patro kaj la filo, la vilaĝestroo kaj Volodaĉo transboatis la riveron kaj venis aliborden en la vilaĝon Krjakovo, kie estis drinkejo, kaj tie longe diboĉis. Aŭdeblis kiel ili kantadis kaj kiel kriadis la juna Lyĉkov. En la vilaĝo virinoj maldormis dum la tuta nokto kaj maltrankviliĝis. Rodiono ankaŭ maldormis.



— Malbona afero, — li diris, ruliĝante de flanko al flanko kaj sopirĝemante. — La grandsinjoro koleros, poste ni batalu... Insultis la grandsinjoron, ve insultis, malbone.

Foje la kampuloj, inter ili Rodiono, venis falĉi al sia arbaro kaj kiam revenadis, renkontis la ĉefinĝenieron. Li estis en ruĝa kotona ĉemizo kaj en altaj botoj, post li iris ĉashundo, eliginte longan langon.

— Saluton, fraĉjoj! — li diris. La kampuloj haltis kaj demetis la ĉapojn.

— Jam delonge mi volas interparoli kun vi, fraĉjoj, — daŭrigis li. — Jena afero. De plej frua printempo ĉiutage mian ĝardenon kaj arbaron vizitadas via grego. Ĉio estas fortretita, porkoj forfosis la herbejon, damaĝas en la legomĝardeno, kaj en la arbaro la tuta kopso estas detruita. Viaj paŝtistoj estas netrakteblaj, mi ilin petas, kaj ili malĝentilas. Ĉiutage ĉe mi estas damaĝo, sed mi neniagas, ne monpunas vin, ne plendas, tamen vi kaptis miajn ĉevalojn kaj mian bovidon, prenis kvin rublojn. Ĉu tio estas bone? Ĉu najbare? — li daŭrigis, kaj lia voĉo estis tiom milda, konvinka, kaj la rigardo ne estis kruda.

— Ĉu tiel agas decaj homoj? Unu semajnon antaŭe iu via homo forhakis en mia arbaro du kverkojn. Vi transfosis la vojon al Jeresnevo, kaj nun mi devas veturi tri verstojn plu. Pro kio vi ja nocas al mi ĉiupaŝe? Kion mi faris por vi malbonan, diru ja pro dio. Mi kaj la edzino fervore penas vivi kun vi pace kaj konkorde, ni kiel eblas helpas al kampuloj. Mia edzino estas bonkora, ŝi ne rezignas helpi, estas ŝia revo utili al vi kaj al viaj gefiloj. Ja vi pro la bono pagas al ni per la malbono. Pensu pri tio. Persvade petas vin, pensu. Ni traktas vin homece, pagu ja vi al ni per sama monero.

Li sin turnis kaj foriris. La kampuloj iomete staris, metis ĉapojn kaj ekiris. Rodiono, kiu komprenadis tion, kion oni diris al li, ne tiel, liel devas, sed ĉiam iel si-voje, sopiris kaj diris:

— Endas pagi. Pagu, li diris, fraĉjoj, per monero...

Oni ĝisvenis la vilaĝon senvorte. Reveninte hejmen Rodiono preĝis, senŝuiĝis kaj sidiĝis su la benkon apud la edzino. Li kaj Stepanino, kiam estis hejme, ĉiam sidis apude kaj laŭstrate iradis apude, manĝis, trinkis kaj dormis ĉiam kune, kaj ju pli aĝiĝis, des pli amis unu la alian. En ilia domo estis malvaste, varme, kaj ĉie estis gefiloj — ĉe la planko, fenestroj, forno... Stepanino, malgraŭ maluna, ankoraŭ naskadis, kaj nun, rigardante al la svarmo da gefiloj, oni apenaŭ povus difini, kie estas de Rodiono kaj kie de Volodaĉo. La edzino de Volodaĉo — Lukerjo, juna malbela virino kun protrudaj okuloj kaj birdeska nazo, knedis paston en tino, mem Volodaĉo sidis sur la forno piedpende.

— Voje apud Nikita fagopiro ... la ĉefinĝeniero kun hundeto... — komencis Rodiono, post ripozo, gratante siajn flankojn kaj kubutojn. —

Endas pagi, li diris... Per monero, li diris... Ĉu per monero, ĉu ne, tamen po dek kopekojn indas de unu domo. Jani ege insultas la grandsinjoron, ve...

— Vivis ni sen ponto, — diris Volodaĉo, rigardante al neniu, — kaj ne deziras.

— Kial do, la ponto estas ŝtata.

— Ne deziras.

— Oni vin ne konsultos. Kial do!

— “Ne konsultos”... — imitaĉis Volodaĉo. — Por ni mankas kien veturi, kial ni bezonas ponton? Se bezonos, do transboatos.

Iu de la korto frapis tiel forte, ke ŝajne la tuta domo ekstremitis.

— Ĉu Volodaĉo estas hejme? — aŭdiĝis la voĉo de la filo Lyĉkov. — Volodaĉo, eliru, venu ni!

Volodaĉo saltis de la forno kaj ekserĉadis sian kaskedon. — Ne venu, Voloĉjo kara, — diris Rodiono timide. — Ne venu kun ili, filĉjo. Vi estas stulta, kiel eta knabo, kaj ili al vi la bonon ne instruos. Ne venu!

— Ne venu, filĉjo! — petis Stepanino kaj palpebrumis plorpretante. — Certe vokas al drinkejo.

— “Al drinkejo”... — imitaĉis Volodaĉo.

— Refoje revenos ebria, damna Herodo! — diris Lukerjo, rigardante al li malice. — Veni, venu, bruliĝu pro vodko, satano senvosta.

— Nu, vi silentu! — kriis Volodaĉo.

— Edzinigis min je stultulo, malfeliĉan orfinon, pereigis min, ebrulo rufa... — ekhurlis Lukerjo, viŝante la vizaĝon per la mano, kovrita per la pasto.

— Ne metu mi vidon su vin!

Volodaĉo batis ŝin je la orelo kaj foriris.

### III

Jelena Ivanovna kaj ŝia eta filino venis al la vilaĝo perpiede. Ili promenis. Estis ja dimanĉo, kaj ĉestraten disvenis virinoj kaj knabinoj en siaj helaj roboj. Rodiono kaj Stepanino apudsidantaj ĉe la perono, kliniĝis kaj ridetis al Jelena Ivanovna kaj ŝia knabino kiel al konatulinaj. El fenestroj al ili rigardis pli ol deko da infanoj, la vizaĝoj esprimis perpleksecon kaj scivolemon, aŭdiĝis susuro:

— Kuĉerovino venis! Kuĉerovino!

— Saluton, — diris Jelena Ivanovna kaj haltis; ŝi silentis kaj demandis: — Nu, kiel vi fartas?

— Fartas bone, dank’al Dio, — respondis Rodiono rapidvorte. — Rutine vivas.

— Kia estas nia vivo! — subridis Stepanino. — Vi mem vidas, sinjorino, karulino, la mizeron! Entute en la familio estas dekkvar animoj, sed la liverantoj estas du. Nur laŭ la titolo estas forĝistoj: oni venigas ĉevalon por ferumi — karbo mankas, eblas aĉeti per nenio. Turmentiĝis ni, sinjorino, — daurigis ŝi, kaj ekridis, — ege turmentiĝis!

Jelena Ivanovna sidiĝis ĉe la perono kaj, brakuminte la filinon, ekmeditis pri io, kaj ĉe la knabino, laŭ ŝia vizaĝo, en la kapo vagadis malgajaj pensoj, medite ŝi ludis per pimpa punta ombrelo, kiun ŝi prenis el la manoj de la patrino.

— La mizero! — diris Rodiono. — Multaj zorgoj, ni laboras — fino ne videblas. Jen pluvon Dio ne donas... Malbone vivas, kion diri.

— Ĉi-vivo penigas vin, — diris Jelena Ivanovna, — tamen alimonde vi estos feliĉaj.

Rodiono ne komprenis ŝin kaj responde nur tuis en la pugnon. Kaj Stepanino diris:

— Sinjorino, karulino, riĉulo ankaŭ alimonde bonas. Riĉulo starigas kandelojn, diservas preĝojn, riĉulo almozodonas al mizeruloj, kaj kio pri kampulo? Mankas tempo por krucumi la frunton, des pli savi la animon. Pekoj multas pro la mizereco, ja pro malfeliĉo ni interbojas kiel hundoj, mankas bona vorto, kaj iam tio okazas, sinjorino-karulino, — Dio tabuu! Nepre estos ni feliĉaj nek ĉimonde, nek alimonde. La tutan feliĉon gajnis riĉuloj.

Ŝi diris gaje, evidente delonge kutimiĝis paroli pri sia peniga vivo. Kaj Rodiono ankaŭ ridetis; al li plaĉis, ke lia maljunulino estas tiom saĝa, vortoza.

— Ja nur ŝajnas ke riĉuloj vivas facile, — diris Jelena Ivanovna. — Ĉiu homo havas sian malfeliĉon. Jen ni, mi kaj mia edzo, vivas ne malriĉe, ni havas rimedojn, tamen ĉu ni estas feliĉaj? Mi estas ankoraŭ juna, sed mi havas jam kvar gefilojn, la gefiloj ĉiam malsanas, mi ankaŭ malsamas, konstante estas kuracata.

— Kaj kia estas via malsano?

— La virina. Mi ne dormas, estas senpaca pro kapdoloro. Jen mi sidas, parolas, sed sentas naŭzon en la kapo, feblon en la tuta korpo, kaj mi konsentas, pli bonas plej pena laboro, ol tia stato. Kaj la animo estas malpaca. Konstante mi timas pro la gefiloj, la edzo. Ĉiu familio havas ian malfeliĉon, ankaŭ ni havas. Mi ne estas nobelino. Mia avo estis ordinara kamparano, la patro komercis en Moslvo kaj ankaŭ estis ordinara homo. Kaj mia edzo havas meritajn kaj riĉajn gepatrojn. Ili ne volis ke li edziĝu je mi, sed li malobeis, malpacis kun ili, kaj jen ili ĝis nun ne pardonas nin. Tio malpacigas la edzon, maltrankviligas, lasas en konstanta malkvieto. Nu, ankaŭ mi maltrankviliĝas. La animo doloras.

Apud la dometo de Rodiono jam staris viroj kaj virinoj kaj aŭskultis. Alvenis Kozov kaj haltis, skuante per sia longa mallarĝa barbeto. Alvenis Lyĉkovoĵ, la patro kaj la filo.

— Ja mi diru, ke oni ne povas esti feliĉa kaj kontenta, se oni ne sentas sin ĝustaloke, — daŭrigis Jelena Ivanovna. — Ĉiu el vi havas sian zonon, ĉiu el

vi laboras kaj scias, por kio laboras, mia edzo konstruas pontojn, unuvorte ĉiu havas sian lokon. Kaj mi? Mi nur iradas. Mi ne havas propran zonon, mi ne laboras kaj sentas min kiel fremda. Ĉion tion mi diras por ke vi ne juĝu laŭ aspekto, se homo estas vestita riĉe kaj havas rimedojn, tio ankoraŭ ne signifas, ke la homo estas kontenta pro sia vivo.

Ŝi leviĝis por iri for, kaj manprenis la filinon.

— Al mi ĉi tie ĉe vi tre plaĉas, — diris ŝi kaj ridetis, kaj laŭ tiu ĉi malforta, malkuraĝa rideto juĝeblis, kiel ŝi vere estas malsana, kiel ankoraŭ juna kaj bela, ŝi havis palan magran vizaĝon kun malhelaj brovoj kaj blondajn harojn. Kaj la knabino estis kiella patrino, magra, blonda kaj svelta. Ambaŭ odoris per parfumo.

— Plaĉas kaj la rivero, kaj la arbaro, kaj la vilaĝo... — daŭrigis Jelena Ivanovna. — Mi povus travivi ĉi tie tutan mian vivon, kaj ŝajnas, ke mi ĉi tie saniĝus kaj trovus mian lokon. Mi volas, arde volas helpi al vi, esti utila, proksima. Mi scias vian bezonon, kaj tion, kion ne scias, mi sentas, divenas per la koro. Mi estas malsana, malforta, por mi, ŝajnas, jam ne eblas ŝanĝi mian vivon, kiel mi dezirus. Sed mi havas infanojn, kaj mi penos eduki ilin tiel, ke ilu adaptiĝus al vi, ŝatus vin. Mi ĉiam sugestos al ili, ke ilia vivo apartenas ne al ili, sed al vi. Nur mi petas vin konvinkeme, admonas, kredu al ni, vivu kun ni amike. Mia edzo estas bonkora homo. Ne kolerigu, ne incitu. Li estas sentema al ajna bagatelo, tamen, ekzemple, hieraŭ via grego estis en nia legomĝardeno, kaj iu el viaj homoj rompis la hurdon ĉe nia abelejo, kaj tia konduto desperigas lin. Mi petas vin, — daŭrigis ŝi per admona voĉo kaj kunmetis la brakojn sur la brusto. — mi petas vin, rilatu al ni kiel bonaj najbaroj, vivu ni en paco! Estas jadirite, ke malbona paco pli bonas ol bona malpaco, kaj ne aĉetu bienon, sed aĉetu najbaron. Mi ripetas, mia edzo estas bona homo, se ĉio estos bonstata, ni, promesu mi, faros ĉion, kion ni kapablos, ni riparos vojojn, konstruos lernejon por viaj infanoj, promesu mi.

— Jen, certe, ni dankas humile, sinjorino, — diris Lyĉkov la patro, terrigardante, — vi estas kleraj, pli spertas. Jen tamen en Jeresnevo Voronov, la riĉulo, nu, promesis konstrui lernejon, same diris — ni por vi kaj ni por vi, tamen instalis nur trabaĵon kaj rezignis, kaj oni iĝis la kampulojn meti la tegmenton kaj ĝisfini, konsumi mil rublojn. Nu, por Voronov problemoj nulas, li nur la barbon glatetas, sed la kampuloj iom rankoras.

— Estis voronto, venis manĝonto, diris Kozov kaj palpebrumis. Aŭdiĝis ridaĉo.

— Ne bezonas lernejon, eldiris Volodaĉo malafable. — Niaj geknaboj frekventas Petrovskoje, kaj frekventu. Ne deziras.

Jelena Ivanovna tuj kvazaŭ ektimidis. Ŝi iĝis pala, morna, premita, kvazaŭ tuŝita per io kruda, kaj ekiris sen pli da vortoj, irante pli kaj pli rapide.

— Sinjorino! — vokis Rodiono, irante post ŝi. — Sinjorino, atendu-do, ion mi diros al vi.

Li postiris ŝin, sen ĉapelo, kaj diris kviete, kvazaŭ almozpetis:

— Sinjorino! Atendu, ion diros al vi.

Ili eliris la vilaĝon, kaj Jelena Ivanovna haltis en ombro de maljuna sorpo, apud ies ĉaro.

— Ne ofendiĝu, sinjorino, — diris Rodiono. — Ne gravas! Vi toleru. Du jarojn toleru. Vivos ĉi-tie, toleros, kaj ĉio enordos. La popolo ĉe ni estas bona, humila... la popolo sen-ia, kiel antaŭ la Vera al vi diras. Vi ne rigardu al Kozov kaj al Lyĉkovoĵoj ne rigardu, kaj al Volodaĉo ne rigardu, li ĉe ni estas stultuleto, kiu la unua diris, tiun auskultas. Ceteraj estas humila popolo, silentas... Iu, notu, estus feliĉa konsciencive vortumi, pledi, jen, sed ne povas. Havas kaj animon, kaj konsciencon, sed vorton ne havas. Ne ofendu... toleru... Ne gravas!

Jelena Ivanovna rigardis al la larĝa trankvila rivero, pri io meditis, kaj larmoj fluis laŭ ŝiaj vangoj. Kaj Rodionon konfizis tiuj larmoj, li mem preskaŭ ploris.

— Vi... ne gravas... — balbutis li. — Toleru unu-du jarojn. Eblas kaj lernejon, kaj vojojn, sed ne tuj... Volas, ekzemple, semi grenon ĉe ĉi-flanko, do komence elradikigu, eligu ĉiujn ŝtonojn, kaj poste plugu, iradu kaj iradu. Kaj kun popolo, notu, tiel... iradu kaj iradu, ĝis superigos.

De la Rodiona domo apartiĝis amaso kaj venis laŭ la strato ĉi-flanken al la sorpo. Oni ekkantis, ekludis harmoniko. Kaj alvenadis pli kaj pli proksimen.

— Panjo, veturu ni for de ĉi-tie, — diris la knabino, pala, premante sin al la patrino kaj tremante tutkorpe. — Veturu ni for, panjo!

— Kien?

Al Moskvo... Veturu ni for, panjo!

La knabino ekploris. Rodiono plenkonzuziĝis, lia vizaĝo ege ŝvitiĝis. Li prenis el poŝo kukumon, malgrandan, kurban kiel lunarko, panerŝutitan, kaj ekŝovadis ĝin en manojn de la knabino.

— Nu, nu... — ekbalbutis li kun mieno malserena kaj severa. — Prenu-do la kukumeton, manĝu... Plori malindas, la patrinjo batetos... hejme plendos al la patro... Nu, nu...

Ili venis plu, kaj li venadis post ili, dezirante diri al ili ion teneran kaj konvinkan. Kaj vidante, ke ambaŭ ili estas okupataj per siaj pensoj kaj per sia veo kaj ne rimarkas lin, li haltis kaj ŝirmante okulojn pro la suno, postrigardis ilin longe, ĝis ili kaŝiĝis en sia arbaro.

#### IV

La ĉefingĝeniero verŝajne iĝis kolerema, vanta, en ajna bagatelo jam vidis ŝtelon aŭ atencon. Lia pordego estis ŝlosita eĉ tage, kaj nokte en la ĝardeno iradis du gardistoj kaj frapis en tabulon, kaj jam neniu el Obruĉanovo oni dungis portage. Kiel intence iu (el kampuloj aŭ el proletoj — oni ne scias)

demetis de la ĉaro novajn radojn kaj ŝanĝis ilin je la malnovajn, iom poste oni forportis du bridetojn kaj tenajlon, kaj eĉ en la vilaĝo komenciĝis tumulto. Oni ekdiris, ke indas fari priserĉadon ĉe Lyĉkovoĵ kaj ĉe Volodaĉo, kaj do la tenajlo kaj la bridetoj troviĝis en la ĝardeno de la ĉefinĝeniero sub barilo: iu subjetis.

Foje oni venis amase el arbaro, kaj denove renkontis la ĉefinĝenieron. Li haltis kaj sensalute, rigardante kolere ĉu al unu ĉu al alia ekis:

— Mi petis ne kolekti fungojn en mia parko kaj apud la korto, lasi por mia edzino kaj geknaboj, sed viaj knabinoj alvenadas eklume kaj poste restas nek unu fungo. Ĉu oni vin petu, ĉu ne — tutegalas. Ĉu petoj, ĉu afableco, ĉu konvinkoj — evidente ĉio estas vana. Li haltigis sian indignantan rigardon ĉe Rodiono kaj daŭrigis:

— Mi kaj mia edzino rilatis al vi kiel al homoj, la egalaj, kaj vi? Nu, pri kio temas! Ni finos, verŝajne, tiel, ke vin fiestimos. Restas plu nenio!

Kaj streĉiĝinte, detenante la koleron, por ke ne diri ion superfluan, li turniĝis kaj pluiris.

Reveninte hejmen, Rodiono preĝis, sensuiĝis kaj prenis benkon apud sia edzino.

— Jes... — komencis li ripozinte. Ni ĵus iras, kaj la mastro Kuĉerov iras renkonten... Jes... knabinaĉojn vidis eklume... Kial, li diras, fungojn ne alportas... al la edzino kaj geknaboj. Kaj poste al mi rigardas kaj diras: mi, li diras, vin kun via edzino filantropos. Mi volis al li piedkliniĝi, sed ektimis... Dio donu al ili sanon... Dio sendu al ili...

Stepanino kruciĝis kaj enhalis.

— La mastroj estas bonaj, simplecaj... — daŭrigis Rodiono. — «Filantropos...» — ĉe ĉiuj promesis. Por malunaj aĝoj ja... estus nemalbone... Eterne por ili mi preĝus... Dipatrino sendu...

Je Kruclevigo, la 14-an de septembro, estis festo de la preĝejo. Lyĉkovoĵ, la patro kaj la filo, ankoraŭ matene veturis aliborden kaj revenis al la tagmanĝo ebriaj; ili iradis longe laŭ la vilaĝo, jen kantis, jen blasfemis, poste interbatalis kaj venis al la vilao por plendi. Komence eniris la korton Lyĉkov la patro kun longa tremola bastono en la manoj; li malkuraĝe haltis kaj demetis la ĉapon. Ĝuste tiutempe ĉe la teraso sidis la ĉefinĝeniero kun la familio kaj teumis.

— Kion vi volas? — kriis la ĉefinĝeniero.

— Via alta moŝto, sinjoro... — ekis Lyĉkov kaj ekploris. — Aperigu digracon, protektu... Malvivo pro la filo... Mizerigis min la filo, batas... via alta moŝto... Eniris ankaŭ Lyĉkov la filo, sen ĉapo, same kun bastono; li haltis kaj fiksas ebrian sensencan rigardon ĉe la teraso.

— Ne mia afero estas vin juĝi, — diris la ĉefinĝeniero. Venu al vilaĝestro aŭ poliestro.

— Mi ĉie estis... plendis... — diris Lyĉkov la patro kaj ekploregis. — Nun kien mi venu? Do nun li min povas murdi? Do li ĉion povas? Do la patron? La patron?

Li levis la bastonon kaj batis la filon sur la kapon; la filo levis sian bastonon kaj batis la maljunulon ĝuste sur la kalvaĵon, la bastono eĉ saltis. Lyĉkov la patro eĉ ne ŝanceliĝis kaj refoje batis la filon, kaj refoje sur la kapon. Kaj tiel ili staris kaj batadis unu la alian sur la kapojn, kaj tio similis ne interbatadon sed ian ludon. Kaj malantaŭ la pordego amasiĝis kampuloj, viroj kaj virinoj, kaj silente rigardis al la korto, kaj ĉies vizaĝoj estis gravaj. La kampuloj venis por gratuli okaze la festo, sed vidinte Lyĉkovojn konfuziĝis kaj ne eniris la korton.

Sekvontmatene Jelena Ivanovna forveturis kun gefiloj al Moskvo. Kaj oni ekdiris, ke la ĉefinĝeniero vendas sian bienon.

## V

Oni delonge al kutimiĝis al la ponto, kaj jam apenaŭ povis imagi la riveron ĉi-loke sen ĝi. Rubejoj, restintaj post la konstruado, jam delonge kovriĝis per herbo, oni fogesis pri proletoj, kaj anstataŭ “Dubinuŝka” nun preskaŭ ĉiun horon aŭdiĝas bruoj de venanta trajno.

Nova Vilao estas delonge vendita; nun ĝi apartenas al iu ŝtatoŝtato, kiu dum festoj alvenadas ĉi-tien de la urbo kun la familio, trinkas teon ĉe la teraso kaj poste forvenadas reen al la urbo. Li havas kokardon ĉe la kaskedo, li parolas kaj tusas kiel tre grava ŝtatoŝtato, malgraŭ li havas la rangon de kolegia sekretario, kaj kiam kampuloj antaŭ li kliniĝas, li ne respondas.

En Obruĉanovo ĉiuj maljuniĝis, Kozov jam mortis, en la dometo de Rodiono beboj plimultiĝis, ĉe Volodaĉo kreskis longa rufa barbo. Vivas kiel antaŭe malriĉe.

Fruprintempe obruĉanovanoj segas lignaĵon apud la stacio. Jen ili post laboro iras hejmen, iras senhaste, unu post alia, arkiĝas sur la ŝultroj larĝaj segiloj, flagretas en ili suno. En arbustoj ĉe la bordo fajfas najtingaloj, ĉiele jodlas alaŭdoj. Ĉe Nova Vilao kvietas, estas neniuj, nur oraj kolomboj, oraj pro tio, ke ilin lumigas suno, flugadas super la domo. Ĉiuj – kaj Rodiono, kaj ambaŭ Lyĉkovoj, kaj Volodaĉo – rememoras la blankajn ĉevalojn, etajn poneojn, fajraĵojn, boaton kun lanternoj, rememoras kiel la edzino de la ĉefinĝeniero, bela, pimpa, venadis al la vilaĝo kaj tiel tenere parolis. Kaj ĉio tio kvazaŭ ne estis. Kvazaŭ ŝonĝo aŭ fabelo.

Ili iras, piedo post piedo kaj meditas.

En ilia vilaĝo, meditas ili, la popolo estas bona, trankvila, prudenta, timas Dion, kaj Jelena Ivanovna ankaŭ estas trankvila, bona, kvieta, kompatindis rigardi al ŝi, sed kial do ili ne kunvivis kaj disiĝis kiel malamikoj? Kio estis tiu nebulo, kiu ŝirmis de okuloj plej gravon, kaj estis videblaj nur

damaĝoj, bridetoj, tenajloj kaj ĉiuj tiuj etaĵoj, kiuj nun rememorante ŝajnas tiom bagatelaj? Kial kun nova posedanto ili vivas pace, kaj kun la ĉefinĝeniero ne amikis?

Kaj ne sciante kion respondi je tiuj-ĉi demandoj, ĉiuj silentas, kaj nur Volodaĉo ion balbutas.



— Kion? — demandas Rodiono.

— Vivis ni sen ponto... — diras Volodaĉo makabre. — Vivis ni sen ponto kaj ne petis... kaj ne bezonas.

Al li respondas neniu, kaj ili iras plu silente, kapojn pendinte.

*Tradukis Aleksandr Milner (Moskvo)*  
**12.03.2007**

## *Konkurso de tradukoj*

Karaj Legantoj!

Ni anoncas novan lingvan-literaturan konkurson pri traduko de diversaj “flugantaj esprimoj”, kutimaj en la rusa, sed malfacile transdoneblaj al aliaj lingvoj, eĉ en al la internacia. Por la komenco provu traduki la sekvan esprimon, konatan el la poemo de Nikolao Nekrasov (tiu, kiu estis la rusa poeto, sed ne tiu, kiu estis la esperantlingva):

**"Бывали хуже времена, но не было подлей".**

Kompreneble, traduko de la plena poemo “Samtempuloj”, aŭ almenaŭ ĝia enkonduko, kiu enhavas la esprimon, estos nur salutata!

La rezultojn sendu al la adreso [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru).

## *Respondoj al la Versportret-konkurso*

1. Marjorie Boulton. 2. Mikaelo Bronŝtejn. 3. Trevor Steele. 4. Nicola Ruggiero kaj Balduŝ Ragnarsson. 5. Giorgio Siffer. 6. Renato Corsetti. 7. Katalin Kovats. 8. Istvan Ertl. 9. Jorge Camacho. 10. Dima Sevcenko kaj Anna Stiganova. 11. Chuck Smith.



## *Humuro*

### ***Iom da materialoj de la urala reta aktivaĵo “Transdonu bonhumoron”, elektitaj de ties kunordiganto Raja Kudrjavceva.***

Diru ion ajn, sed printempe vi eltenas vintron pli facile.

Ni ĉiuj estas pentristoj de nia vivo. Ies bildoj brilas per buntaj farboj, la aliaj pentras la nigran kvadraton.

*Sendis Dilara Gadirova (Tobolsko)*



En arbaro oni trovis la ostaron de la mondĉampiono pri kaŝludo.

Angola glitkuristo alportis kelkajn orajn medalojn al sia teamo. Kie li prenis ilin, neniu scias.

Memregado estas kiam anstataŭ ol plialtigi vian voĉon vi nur levetas brovon kaj demandas trankvile: "Ĉu vi estas senmorta?"

*Sendis Sergej Kumkov (Jekaterinburgo)*

Aleksandr Osincev (Jekaterinburgo) sendis kelkajn ŝercajn aforismojn de *G. Handzlik* el lia libro "*Verdeskaj pensoj*":

"Pli bone havi monon sen bankokonto ol konton sen mono."

"Li partoprenis por parton preni."

"Se mil homoj ripetas malveron, ĝi eble fariĝos leĝo, sed neniam la vero."

\*\*\*

...Inter la indicoj de tio, ke vi estas malsaĝulo, la revuo "Krasnaja burda" nomas tiujn:

- vi havas fortunon;
- vi hejme ne tranoktas, alumetojn ŝtelas;
- vi havas malvarmajn orelojn;
- vi ridas sen kaŭzo.

Cetere, la indico de tio, ke vi estas malsaĝulo, povas esti la fakto, ke vi havas ILIN, dum ĉiuj aliaj ILIN jam ne havas.

Nomu ILIN per unu vorto :)

La demando estas dediĉata al memoro de Viktoro Kudrjavcev, ĉar "Krasnaja Burda" estis lia plej ŝatata revuo.

*Sendis: Roman Jefremov (Glazovo)*

Geamikoj, ni estas oftaj atestantoj de interesaj kaj kuriozaj amuzaĵoj. Hodiaŭ mi volus prezenti al vi du realajn historietojn, ligitajn kun esperantistoj. Mi memoras ankoraŭ kelkajn. Sed mi ĝojus, se iu daŭrigus ĉi tiun teman linion per propraj rakontoj kaj rememoroj.

La 22-a OrSEJT okazis en julio-aŭgusto de 1980 en la sama turista bazejo "Parus", situanta apud la fama Krasnojarska akvoenergia centralo. La tendaro estis dediĉita al la Someraj Olimpikoj-1980 en Moskvo. La Organizan komitaton gvidis kaj la tutan programon kunordigis Vladimir Sapojnikov, kiu rigore postulis striktan plenumon de ĉiuj antaŭplanitaj programeroj el la tagordo. Sed, ĉar la junulara publiko emis malmulte dormi kaj pasigis noktojn dancante, babilante kaj kantante ĉe la lignofajro, frumatene ĝi ne povis tiel facile ellitiĝi. Sed malobeo de la tendara disciplino ne estis tolerebla de la Organiza komitato, kaj ĉiumatene dum la sunleviĝo inter la dometoj kaj tendoj paŝadis sur roskovritaj padetoj Vladimir Sapojnikov, ekipita per manlaŭtparolilo, kaj disaŭdigis la solan insistan ordonon: "Vekiĝu! Ellitiĝu!" La vortoj, plilaŭtigataj de la aparato, sonis tiel tondre, ke eĉ tiuj, kiuj venis al ripozo nur antaŭ du-tri horoj en frumatena krepusko, devis vole-nevole rezigni la dolĉan dormadon. En la rondo de dumnoktaj petolantoj la laŭtparolilo iĝis tre abomena objekto, kaj ili trovis por ĝi ekskluzive originalan derivaĵon, esprimantan ilian abomenon al la senkompatate indifera vekilo. Ekde la unua tago ĝi estis nomata "materilo".

*Sendis Vladimir Opletajev (Surguto)*



Esti turisto signifas turni la kapon kaj sekvi junulinon per la rigardo nur por vidi kiun dorsosakon ŝi kunhavas.

Hieraŭ nian turistan grupon oni forigis el la hotelo. Ne pro tio, ke ni kantis kantojn en la hotelĉambro, sed pro tio, ke ni kantis ĉe lignofajro.

*Sendis Vjaĉeslav Gusev (Jekaterinburgo)*

Se vi ne povas elspezi monon, tiam edziĝu!

– Ĉu tio estas ĉio pri kio vi kapablas?

– Ne, tio estas ĉio kion vi meritas.

*Sendis Lidija Jerofejeva (Niĵnij Tagilo)*

Estas bone, ke li ne estis okulisto!

Foje min ekdoloris dento. La akra doloro trapikis la tutan korpon. Ŝajnis, ke doloro estis en la cerbo, kaj en la koro, kaj eĉ en la kalkanoj. Do, mi devis viziti dentiston. La dentisto faris al mi lokan anestezon kaj per terura maŝino longe boris la denton. Kaj poste diligente kaj same longe kuracis ĝin. Post la fino de la laboro li etendis al mi la spegulon, por ke mi povu vidi la rezulton. Kia estis mia miro, kiam mi konstatis, ke li kuracis ne la malsanan, sed la najbaran denton! Al mia rimarko, ke mi ja havis la doloron de tute alia dento, li trankvile respondis, ke tiu ĉi ankaŭ postulis sanigon, kaj denton, kiu min maltrankviligis, li povos kuraci, se mi vizitos lin morgaŭ. Dum la nokto min denove turmentis la dentodoloro.

Preskaŭ freneziĝinta matene mi denove kuris al tiu dentisto. Kaj fine li kuracis la bezonatan denton.

Pri tiu historio mi rememoris, kiam mi aŭdis la jenan anekdoton:

Dentisto al la paciento:

— Kara mia, mi devas konfesi, ke mi erare forigis al vi la sanan denton. Nun tamen necesas forigi la malsanan.

— Nu, kion fari, - respondis la paciento. - Bonas, ke vi ne estas okulisto!

Kaj mi ekpensis, ke en fundamento de ĉiu anekdoto kuŝas similaj historioj el reala vivo. :)

*Sendis Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo)*

Programisto estas homo, kiu solvas per tute nekomprenebla al vi maniero problemojn, pri ekzisto de kiuj vi eĉ ne supozis.

Programisto fordonis sian jakon en vestejon, ricevis la numermarkon 404 kaj nun timas, ke anstataŭ redoni al li lian jaketon, servistino de la vestejo diros al li: "La jaketo ne estas trovita"

*Sendis Vera Matvejeva (Jekaterinburgo)*

-Panjo, ĉu ni veturos somere al maro?

-Al maro, fileto, veturos viaj repetitoroj.

Leciono en la unua klaso.

— Manjo, kiel nomiĝas homoj, dank' al kiuj ni havas elektron?

— Elektristoj.

— Ne, — diras Vovĉjo, — ili nomiĝas idiotoj.

— Kial?

— Ĉu vi scias, Maria Ivanna, kiam ni ne havas lumon, mia patro ĉiam diras: "Kiam tiuj idiotoj ŝaltos la lumon?"

*Sendis Petro Fedosov (Moskvo)*

99 % de kosmo ne estas esplorita, 95 % de oceano ne estas esplorita, 90 % de nia cerbo ne estas

esplorita. Jen la demando: pri kio ni okupiĝas? Ĉu nur sidas en la oficejoj?

Ebriulo falis nokte kvarpiede en flakon. Ekrigardis suben – ba, steloj!  
Ekrigardis supren – ba, ankaŭ steloj. Kaj pensas: do, oni sendis min en kosmon! Kaj sen peceto de pano ja!

Eliri sen orelaŭskultiloj elhejme similas al tio, kiel eliri en liberan kosmon sen oksigeno.

*Sendis Nadeĵda Panova ( Tjumeno)*

Eterno estas tempo de komenco de labortago kaj ĝis ĝia fino. Kaj momento estas 28 kalendaraj tagoj *de ferioj*.

Mi ŝategas legi horoskopojn. Tio estas sola loko, kie mi havas monon, vojaĝojn kaj idealajn interrilatojn.

Mi senfine vojaĝas. Surtere ĉirkaŭ la suno.

*Sendis Aleksandra Osipova ( Jekaterinburgo)*

– Petrov, kial vi tiom malbone lernas la anglan?

– Sed por kio?

– Kiel por kio? Ja en tiu lingvo parolas la duono de la mondloĝantaro!

– Kaj ĉu tio ne sufiĉas?

Viro dungiĝas por labori.

– Ĉu vi posedas Esperanton? Foje ni korespondas Esperante kun kelkaj partneroj.

– Ĉu mi posedas? Mi ja loĝis tie dum tri jaroj!

*Sendis Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo)*

---

## **CERBE kaj KORE**

**n-ro 4 (72), majo 2018**

**Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 96**

**BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo**

**“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”**

***Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta indiko de la fonto***

**CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-  
metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi  
ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@uandec.ru](mailto:nikolao@uandec.ru) .**

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

---

Redaktofino 25.05.2018